

Estimataj, karaj samakademianoj,

jam ekde la komenco de la jaro AIS havas novan senaton, elektitan dum nia studad-sesio SUS 32 en Sibiu-Hermannstadt (RO). Ĝi gvidos la akademion ĝis la fino de la jaro 2015.

La novaj, parte ankaŭ malnovaj senatanoj estas la profesoroj Fössmeier, Poláková, Quednau, Wickström kaj mi kiel prezidanto.

SUS 32 okazis en ejoj de Universitato Lucian Blaga de Sibiu (ULBS) kaj estis pruvo pri nia funkcianta kunlaboro kun tiu institucio, kie elstare reprezentas nin EProf. Dr. Sara Konnerth. Iom ŝanĝita programskemo favoris partoprenantojn, kiu povis veni nur por kelkaj tagoj, ĉar la kursoj estis kompaktigitaj al po du tagoj de po kvar lecionoj ( $2 \times 4$  anstataŭ  $4 \times 2$ ). Okazis kvin kursoj kaj deko da prelegoj, ĉiuj en ILO. Por unu kurso ULBS disponigis komputilēambrojn por praktikaj ekzercoj.

Dum la solena inaŭguro, enkondukitा de la himno rumana kaj sanmarina kaj la kanto "La Vojo", prof. Hudițeanu emfazis la multjaran tradicion de la kunlaboro inter AIS kaj ULBS. Dum la fina ekzamena sesio du AIS-anoj, d-ro Sara Konnerth (ULBS) kaj prof. Zlatko Hinšt (Zagrebo, HR) adoptigis sian doktorecon fare de AIS.

Prelego de EProf. ADoc. Mag. Alicja Lewanderska-Quednau dr honoris la rumanan poeton, scienciston kaj politikiston Lucian Blaga, kies nomon portas la universitato. Pluraj SUS-anoj kontribuis ankaŭ al simpozio pri kommunikado, kreivo, esploro en didaktikaj profesioj, kiun malfermis prelego de la tiama AIS-prezidanto OProf. Pennacchietti.

Kaj la akademia forumo de SUS 32 kaj parto de la diskuto de la Ĝenerala Asembleo estis dediĉitaj al la estonteco de AIS, interalie ĉar necesis elekti novan senaton. La nova senato konsistas el la supre nomitaj profesoroj; kiel vicesenatanoj elektiĝis la profesoroj Minnaja, Pennacchietti, Lobin, Corsetti, Wandel kaj Korjenevskaja-Gouriou

Aliaj studadsesioj (sen finaj ekzamenoj) okazis kiel AIS-IKU kadre de la Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago (DK) kaj kiel IVU (Internacia Vintra Universitato) dum la Internacia Festivalo en Xanten (DE). En januaro 2012 du AIS-anoj, AProf. Ronald Glossop kaj Federico Gobbo instruis en la ĉina projekto "Esperanto-Insulo".

La eldonado de la plurlingva revuo GrKG/H, kiun kunfinancas la Subtena Sektoro de AIS, fluis regule kvar fojojn en la jaro. Bedaŭrinde ni ne sukcesis revivigi nian revuon "Acta Sanmarinensis", kiu pro marko-juraj disputoj devus aperi kun modifita titolo.

En 2012 ni planas unue kunsidon de la Ĝenerala Asembleo de la Scienca Sektoro, kiu senŝarĝigu la antaŭan senaton; invitilon vi trovas kun ĉi tiu cirkulero. Por prepari la kunsidon pluraj senatanoj kunvenis en februaro en Munkeno (DE), kie okazos

Sehr geehrte, liebe Angehörige unserer Akademie,

schon seit Jahresbeginn hat die AIS einen neuen Senat, der bei unserer Studentagung SUS 32 in Sibiu-Hermannstadt (RO) gewählt wurde. Er führt die Akademie bis zum Ende des Jahres 2015.

Die neuen, teils auch wiedergewählten Senatoren sind die Professoren Fössmeier, Poláková, Quednau, Wickström sowie ich als Präsident.

SUS 32 fand in Räumlichkeiten der Lucian-Blaga-Universität von Sibiu statt und war ein Beweis unserer funktionierenden Zusammenarbeit mit dieser Einrichtung, bei der uns EProf. Dr. Sara Konnerth hervorragend vertritt. Ein leicht abgeändertes Programmschema ermöglichte auch eine sinnvolle Teilnahme während nur einiger Tage, da die Kurse auf je zwei Tage zu vier Stunden zusammengefasst wurden ( $2 \times 4$  statt  $4 \times 2$ ). Es fanden fünf Kurse und ein knappes Dutzend Vorträge statt, alle in ILO. Für einen Kurs stellte die ULBS einen Rechnerraum für praktische Übungen zur Verfügung.

Während der feierlichen Eröffnung, die durch die rumänische und die sanmarinesische Hymne sowie das Lied "La Vojo" eingeleitet wurde, betonte Prof. Hudițeanu die langjährige Tradition der Zusammenarbeit zwischen AIS und ULBS. Bei der abschließenden Prüfungssitzung erwarben zwei AIS-Kollegen, Dr. Sara Konnerth (ULBS) und Prof. Zlatko Hinšt (Zagreb, HR) eine Angleichungsnostrifizierung ihres Doktortitels.

Ein Vortrag von EProf. ADoc. Mag. Alicja Lewanderska-Quednau dr ehrte den rumänischen Dichter, Wissenschaftler und Politiker Lucian Blaga, dessen Namen die Universität trägt. Mehrere SUS-Teilnehmer trugen auch in ILO zu einem Symposium über Kommunikation, Kreativität und Forschung in den Lehrberufen bei, das durch einen Vortrag des damaligen AIS-Präsidenten OProf. Pennacchietti eröffnet wurde.

Sowohl das Akademische Forum von SUS 32 als auch ein Teil der Diskussionen der Vollversammlung waren der Zukunft der AIS gewidmet, nicht zuletzt, da ein neuer Senat gewählt werden musste. Der neue Senat besteht aus den oben aufgeführten Professoren; als Prosenatoren wurden die Professoren Minnaja, Pennacchietti, Lobin, Corsetti, Wandel und Korjenevskaja-Gouriou gewählt.

Andere Studentagungen (ohne Abschlussprüfungen) fanden als AIS-IKU im Rahmen des Esperanto-Weltkongresses in Kopenhagen (DK) und als IVU (Internationale Winter-Universität) beim *Internacia Festivalo* in Xanten (DE) statt. Im Jänner 2012 lehrten zwei AIS-Angehörige, AProf. Ronald Glossop und Federico Gobbo, im Rahmen des chinesischen Projektes "Esperanto-Insel".

Die mehrsprachige Zeitschrift GrKG/H, die der Fördersektor der AIS mitfinanziert, erschien regelmäßig viermal jährlich. Leider ist es bisher nicht gelungen, unsere Zeitschrift "Acta Sanmarinensis" wiederzubeleben, die aus markenrechtlichen Gründen unter einem veränderten Titel erscheinen müsste.

Für 2012 planen wir zunächst eine Sitzung der Vollversammlung des wissenschaftlichen Sektors zur Entlastung des letzten Senates; eine Einladung liegt bei. Zur Vorbereitung der Sitzung trafen sich mehrere Senatoren im Februar in München (DE), wo auch die Sitzung stattfindet.

ankaŭ la kunsido de la ĜA.

AIS kaj UEA planas, kiel ĉuijare, okazigi la kongresan universiton AIS-IKU, kadre de la Universala Kongreso de Esperanto en Hanojo (VN). Eble jarfine denove okazos IVU, tiam en Dortmund (DE). Ankoraŭ ne estas certe, ĉu en 2012 okazos SUS 33; kandidata loko estas Varsovio (PL).

El la diskutoj dum SUS 32 evidentigis, ke dum la nuna senata periodo AIS devas tute koncentriĝi al la aktivigo de sciencistoj, kiuj fine de 2015 anstataŭos la nunan estraron. Por tio necesas, ke taŭgaj kolegoj jam nun estu enkondukataj en la organizadon de AIS. Kiu do interesigas pri aktiva, ne nur sciencia, sed ankaŭ administra kunlaboro en AIS, bonvolu kontakti la nunan senaton por interkonsenti pri detaloj. Se vi konas sciencistojn, kiuj ĝis nun ne kunlaboras kun AIS, sed eble interesigus, aŭ mem alparolu ilin aŭ informu la senaton.

La nuna AIS-estraro devas zorgi pri la aktuala AIS-agado, sed ĝi devas ankaŭ provizi koncepton por la estonta strukturo de AIS, kaj de la vidpunkto rilate la evidantaron kaj rilate la celaron de tiu unika sciencia institucio. Mi persone ne dubas ke la sciencistaro tutmonda, kiu havas aktivan rilaton al la Internacia Lingvo Esperanto, partoprenos en la plua evoluigo de la Akademio Internacia de la Sciencoj (San Marino).

OProf. Hans Michael Maitzen, Prezidanto de AIS

Vieno, 2012-02-28

Die AIS und der Esperanto-Weltbund UEA planen, wie jedes Jahr, eine Kongress-Universität (AIS-IKU) im Rahmen des Esperanto-Weltkongresses in Hanoi (VN). Zum Jahresende findet möglicherweise wieder eine IVU statt, dieses Mal in Dortmund (DE). Es ist noch nicht sicher, ob 2012 eine SUS 33 stattfindet; Kandidatenstadt ist Warschau (PL).

In den Diskussionen während SUS 32 wurde klar, dass sich die AIS in dieser Senatperiode ganz darauf konzentrieren muss, in ihre Arbeit Wissenschaftler einzubinden, die Ende 2015 den jetzigen Vorstand ablösen. Dazu ist es notwendig, geeignete Kollegen bereits jetzt in die Organisation der AIS einzuführen. Wer also an einer aktiven, nicht nur wissenschaftlichen, sondern auch organisatorischen Mitarbeit bei der AIS interessiert ist, möge sich bitte zur Abstimmung von Einzelheiten an den Senat wenden. Wer Wissenschaftler kennt, die bisher nicht mit der AIS zusammenarbeiten, jedoch daran interessiert sein könnten, möge sie selbst ansprechen oder dem Senat einen entsprechenden Hinweis geben.

Der jetzige AIS-Vorstand muss sich um die aktuellen AIS-Agenden kümmern, aber er muss auch ein Konzept für die künftige Struktur der AIS entwickeln, sowohl vom personellen Standpunkt aus als auch hinsichtlich der Zielsetzungen dieser einzigartigen wissenschaftlichen Institution. Ich persönlich hege keinen Zweifel, dass wissenschaftlich Tätige aus der ganzen Welt, die ein aktives Verhältnis zur Internationalen Sprache Esperanto haben, an der Weiterentwicklung der Akademio Internacia de la Sciencoj (San Marino) teilnehmen werden.

OProf. Hans Michael Maitzen, Präsident der AIS

Wien, 2012-02-28

Bonvolu atenti, ke la provizora kunsidejo mencita en GrKG/H 1/2012 ne plu validas. La nova kunsidejo estas Eine-Welt-Haus en Munkeno, kies situon montras la ci-kuna mapeto.

Bitte beachten Sie, dass der vorläufige Versammlungsort, der in GrKG/H 1/2012 angegeben ist, nicht mehr gilt. Der neue Versammlungsort ist das Eine-Welt-Haus in München, dessen Lage die beiliegende Kartenskizze zeigt.

**Einladung** zur ordentlichen Mitgliederversammlung der AIS – Internationale Akademie der Wissenschaften (Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino) e. V. (vormals AIS Deutschland e. V.) am Sonntag, dem 15. April 2012, 14:00 – 15:00 Uhr, im Eine-Welt-Haus, Schwanthalerstr. 80, DE-80336 München. Um Anmeldung per Netzpost an [informo@ais-sanmarino.org](mailto:informo@ais-sanmarino.org) wird gebeten.

Wegen Erkrankung des amtierenden Vorsitzenden, OProf. Dr. habil. Helmar Frank, erfolgt die Einladung durch den Stellvertreter OProf. Wickström.

Tagesordnung:

1. Formalien (Beschlussfähigkeit, Stimmrecht, Protokoll, Tagesordnung)
2. Allgemeiner Bericht des Vorstandes
3. Kassenbericht, Entlastung, Wirtschaftsplan 2012
4. Beschlussfassung über Anträge des Vorstandes
5. Entscheidung über Anträge aus TOP 1
6. Neuwahl des Vorstandes für die Amtsperiode 2012–2015
7. Verschiedenes

Berlin, 2012-02-03

OProf. Bengt-Arne Wickström

**Invito al membrarkunveno de AIS – Internationale Akademie der Wissenschaften (Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino) e. V. je dimanĉo, 2012-04-15, 13:00 – 14:00 horoj, en Eine-Welt-Haus, Schwanthalerstr. 80, DE-80336 München (Germanio). Ni petas pri sinanonco retpoŝta al [informo@ais-sanmarino.org](mailto:informo@ais-sanmarino.org).**

Pro malsano de la oficanta prezidanto, OProf. Dr. habil. Helmar Frank, invitas lia anstataŭanto OProf. Wickström.

Tagordo:

1. Formalaĵoj (kvorumeco, voĉdonrajto, protokolo, tagordo)
2. Ĝenerala raporto de la estraro
3. Financa raporto, senŝargigo, buĝeto 2012
4. Decidoj pri proponoj de la estraro
5. Decidoj pri proponoj el tagordero 1
6. Elektro de la estraro 2012–2015
7. Diversaĵoj

Berlin, 2012-02-03

OProf. Bengt-Arne Wickström


**Invito al kunsido de la Ĝenerala Asembleo** de la Scienca Sektoro de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino. Ĉar la lasta kunveno dum SUS 32 en Sibiu ne povis decidi pri aprobo de la buĝeto kaj senŝargigo de la malnova estraro, la senato invitas al plia kunveno lige kun la membrar-kunveno de la germana AIS-asocio (AIS/IAW). La kunvenejo kaj la proponita tagordo estas identaj al tiuj de la "membrarkunveno de AIS – Internationale Akademie der Wissenschaften" (vidu la koncernan invitilon), escepte de la elektoj, kiuj ne koncernas la ĜA.

Vieno, 2012-02-03

OProf. Hans Michael Maitzen,

prezidanto de AIS

Jena mapeto servu por orientigo survoje al la kunvenejo "Eine-Welt-Haus", Schwanthalerstr. 80, markita per "EWH". Informoj sen garantio.



La metroa stacio (U) "Theresienwiese" estas servata de la linioj U4 kaj U5; bonvolu uzi la orientan elirejon (la malantaŭan, se vi venas de la urbocentro). La trama haltejo (H) Hermann-Lingg-Straße estas servata de la tramaj linioj 18 kaj 19. Salono 109 troviĝas en la unua etaĝo de Eine-Welt-Haus.